

ESPERANTO*INFO

*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

NOVA ETAPO

Jen nova etapo por Esperanto*info! Ĝi estas montrofestro de nia asocio al niaj asocianoj, kaj ĝia jara/duonjara apero tro prokrastigis la alvenon de agadinformoj; tial la estraro de KEA decidis aperigi ĝin ĉiun kvaronjaron. Vi ricevos ĝin retroŝte (ŝpardecido), sed tamen al asocianoj sen rekta aliro al la reto ni sendos ĝin poŝte. Pri la ontaj agadoj, memoru ke vi trovos ilin anoncataj ĉe nia retpaĝo.

BARTOMEU COSTA

Malgaje ni informas pri la forpaso de nia kara samideano Bartomeu Costa el Manlleu. Li estis plurfoje estrarano de KEA, kaj elstaris pro sia afabla kaj amika sinteno.

ESPERANTO* CAT

*Asociació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2014-2015:
individua abonanta membro, 64 eŭroj;
pensuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta
membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,
Agència 001, Barcelona
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
UEA-konto: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:
Prezidanto: Josep Franquesa;
sekretarioj: Xavier Alcalde kaj Gemma
Armadans; vicprezidanto: Carles Vela;
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj: Alfons
Tur, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj
Ramon Perera.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Països Catalans/Kataluna Landaro
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633
Ret-adreso: info@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO ALIĜAS AL LA MANIFESTO DE LA ASOCIOJ AFEKTITAJ DE LA DIKTATURO DE FRANCO



Okazis en la sidejo de Ateneu Barcelonès ronda tablo de la asocioj afektitaj de la frankisma reĝimo, kie Kataluna Esperanto-Asocio partoprenis

La pasintan 27an de septembro okazis en Barcelono ronda tablo de la asocioj afektitaj de la frankisma reĝimo, kie Kataluna Esperanto-Asocio partoprenis. En tiu kunveno oni interkonsentis depostuli la damaĝon suferintan de la kataluna asocio dum la tiama puĉo kaj sekva diktaturo, ankaŭ memore al ĉiuj societoj formortintaj kaŭze de tiu reĝimo.

Frukto de tiu aranĝo estas manifesto, kiun Kataluna Esperanto-Asocio subskribas kune kun pluraj aliaj asocioj kiuj, samkiel ni, suferis la konsekvencojn de la diktaturo de Franco

Ni konsideras, ke temas pri fakto daŭre ne riparita kaj, ke endas laŭtvoĉe depostuli moralan kaj materialan riparon al ĉiu asocio kaj al ĉiu kulturaĵo, por dignigi la plej altajn konceptojn libereco, asociismo kaj civitaneco.

EN RÀDIO GRÀCIA

La pasintan sepan de januaro, la kunordiganto de Kataluna Esperanto-Asocio, Ferriol Macip, partoprenis en la progra-

mo de Ràdio Gràcia "Tot Hi Cap". Krom paroli pri Esperanto, esperantismo kaj pri la historio de la movado en la Kataluna Landaro kaj tutmonde, Farri partoprenis en la sekva radia kunbabilado longe de la tuta programo, inter la kvina kaj la sepa posttagmeze.

"Tot hi cap" (estas loko por ĉio) estas programo realigita de Francesc Minyana, Carlos Andrés, Enric Puigventós, Agustí Sales, David Viñolas, Montse Urán, Ramon Botet kaj Irene Vallbé. Ĝi estas rekte elsendata ĉiun merkredon inter la 17a kaj la 19, kaj relesendata dum la semajno.

Vi povas rete aŭskulti la programon ĉe http://dev-gracia.bcn.cat/radiogracia/podcasts/2015_01/2015_01_07_tothicap.mp3

DUA FAZO DE LA KAMPANJO POR RENOVIGI LA BIBLIOTEKO-ARĤIVON PETRO NUEZ (BAPN)

Post la sukceso de la kampanjo ĉe Verkami, kaj danke al la kuraĝigo de tiu kolektiva venko, ni ekrenovigas la sidejon kaj

mendis la kvar profesiajn bretarojn *BBL shelving systems for libraries*. La inaŭguro de la BAPN okazos post kelkaj monatoj, Intertempe ni lanĉas por kolekti 4000 pliajn eŭrojn kaj atingi entute 10 000 eŭrojn kaj tial aĉeti du pliajn bretarojn, tablon, seĝon kaj la komputilan materialon por katalogi la fonduson de la BAPN. Por tiuj kiuj ne povis ĝis nun kontribui, aŭ ja faris sed emas kaj povas, eblas ĝiri al unu el la sekvaj kontoj:

- Caixa d'Enginyers: IBAN: ES54 3025 0001 15 1433398158, BIC-kodo: CDENESBBXXX
- UEA-konto: kaea-b

La Biblioteko-Arĥivo Petro Nuez (BAPN) estas la biblioteko de Kataluna Esperanto-Asocio registrita en la listo de fakaj bibliotekoj la Registaro de Katalunio. Ĝi enhavas pli ol 100 jarojn da esperanto-historio kaj ĝi integriĝos estonte en la ĝerma monda katalogo de esperanto-bibliotekoj

LA TARAGONA GRUPO AKTIVAS

La taragona esperanto-grupo komencis organizi kursojn kaj aliajn aranĝojn. Vi trovos ilin en la jaŭdaj lecionoj kaj la konversaciaj rondoj inter la 17a30 kaj la 19a30 en Cooperativa Obrera Tarraconense, strato Fortuny 23. Krome, la lastan jaŭdon ĉiumonatan okazas la t.n. esperantaj anguloj en kafejo La Cantonada.

Pliajn informojn ĉe tarragonaesperanto@gmail.com aŭ www.esperanto.cat/tarragona.

ASEMBLEO KAJ LIBROPREZENTO

La pasintan 7an de februaro okazis en la sidejo de Vilaweb, la jara asembleo de Kataluna Esperanto-Asocio, kie asocianoj aprobis la pasintjaran raporton kaj financon, kaj la ĉi-jaran agadplanon kaj buĝeton. La estraro restas sama kun la nova integriĝo de Alfons Tur kiel voĉdonanto.

Post la asembleo, la eldonisto kaj socilingvisto, Jordi Solé i Camardons, prezentis la libron de Juan Carlos Moreno Cabrera, *L'imperi de la llengua comuna. Guia de l'imperialisme lingüistic espanyol*.

VIKTORO SOLÉ ESTOS INSTRUISTO EN SOMERA ESPERANTO STUDADO

Nia samasocio Viktoro Solé estos instruisto de Somera Esperanto-Studado (SES), okazonta en Martin (Slovakio) inter la 11a kaj la 19a de julio. Post kvarjara partopreno kiel studanto kaj du pliajn jarojn kiel instruhelpanto, Solé fariĝas ĉi-jare instruista de la nivelo A1, laŭ la komuna eŭropa referencokadro por lingvoj.

Organizata de E@I, Somera Esperanto-Studado estas unu el la plej prestiĝaj kaj partoprenataj internaciaj staĝoj pri la internacia lingvo, okazanta en Slovakio ĉiun jaron ekde 2007.

Viktoro Solé gvidas la kursojn de Esperanto en Barcelono de antaŭ kelkaj jaroj. Li ankaŭ respondecas pri la peradservo kaj la datumbazo de Kataluna Esperanto-Asocio. Profesie li instruas muzikon kaj gvidas muzikan radio-elsendon.

SIMPOZIO PRI LINGVA JUSTECO

La pasintajn 2an kaj 3an de marto okazis en Berlino simpozio pri lingva justeco, organizita de la esplorgupo pri ekonomio kaj lingvoj de la Humboldt-universitato, kies anoj estas Bengt-Arne Wickström, Michele Gazzola kaj Torsten Templin.

La aranĝo kunigis sepdekon da spertuloj el la kvin kontinentoj. La diversaj prelegoj montris, ke lingva justeco estas emerĝa esplorkampo kie renkontiĝas diversaj akademias fakoj. Tiusece, por kapti la diversajn prezentitajn perspektivojn, sekvas kelkaj ekzemploj pri la prezentitaj laboroj: analizo de la (malegala) sciopovo de la angla en Eŭropa Unio kaj kiel ĝi koncernas la demokratian kvaliton de la eŭropaj institucioj kiam ili laboras nur tiulingve; defendo de la lingva diverseco kiel nedisigebla komplemento de la mankoj en la lingva merkato bazita sur la leĝo pri ofertado kaj mendado; analizo de la lingvaj politikoj de la regno de Havajo konsekvence de koloniigo; statistika studo pri la efikoj de la lingvomerga leĝo en la kreskado de la socia kohereco en Katalunio; alia statistika studo pri la (pozitiva) rilato inter la lernado de la kataluna kaj la salajro de la homoj; esploro pri la rolo de lingvo kiel elemento de povo de la ŝatoj, mola sed ankaŭ malmola; komparo de la

malsimilaj roloj de la denaskaj esperantistoj rilate al denaskaj parolanto de naciaj lingvoj; diversaj analizoj pri la defioj kiujn alportas inmigrado rilate al la lingva justeco; oni ankaŭ prezentis socilingvajn esplorojn pri la situacioj en diversaj landoj, kiel ekzemple Sudano, Barato, Finnlando, Rumanio, Kroatio, diversaj rusiaj respublikoj kaj kelkaj landoj el la sudsahara Afriko. Eĉ estis programero pri historia analizo de la lingva reĝimo ĉe Ligo de Nacioj.

Koncerne al la katalunaj reprezentantoj, elstaras la ĉeesto de ekonomiistoj kiel Mi-quel Caminal de la scienca esplorcetro CSIC kaj Antonio di Paolo de la Universitato de Barcelono, de la profesoro pri lingvistiko Rubeno Fernández kaj de la politikologo Xavier Alcalde. Eĉ se la laborlingvo estis la angla, unu el la aparteco de tiu akademia aranĝo estis, ke la podiuloj havis la eblecon prelegi en aliaj kvin lingvoj: germana, hispana, itala, franca kaj Esperanto. Oni antaŭvidas ke tiu evento okazos ĉiun duan jaron.

La simpozio havis la subtenon, i.a., de Esperantic Studies Foundation.

X.Alcalde

KATALUNAJ ESPERANTISTOJ DEKLAMAS, OKAZE DE LA MONDA TAGO DE POEZIO

Ĉu lingvo kia Esperanto devus esti literatura? Ĉu ĝi devus krei kaj traduki poezion? Unuavide kelkaj povus pensi, ke internacia helplingvo ne devus prioritati literaturan verkadon, sed tamen Esperanto prizorgis tiun aspekton ekde sia origino. Esperanto naskiĝis dum romantikisma periodo, kaj la inciatinto, L.L. Zamenhof, ne nur klopodis krei lingvon neŭtralan kaj facilan por la tuta mond' utilan, sed li ankaŭ zorgis, ke ĝi estu literatura.

Danke al tio, diskoniĝis sufiĉe multa literaturo de minorigitaj lingvoj per ĝia esperantigo, kiel faris katalunaj esperantistoj en la 20aj jaroj pere de la *Kataluna Antologio*.

Ĉi-jare, okaze de la monda tago de la poezio, kelkaj esperantistoj de la Kataluna Landaro sin registris en filmetoj deklamante poemojn en la internacia lingvo. Spektu la filmetojn en la sekcio de novaĵoj de la retejo *esperanto.cat*.